

TRI ĈAPITROJ

EL LA HISPANA VERKO DE

MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA

LA SPRITA JUNKRO

DON KIĤOTO DE MANĈUJO

Esperantigitaj de

CARLO BOURLET || VICENTE INGLADA

KAJ

GEO C. LAW

Honoraj membroj de la
Grupo Esperantista de Murcio (Hispanujo)

Tradukoj rekompencitaj de
tiu ĉi Grupo en la konkurso literatura okazinta en
rememoro pri la tria centjaro post publikiĝo
de la senmorta ĉefverko Cervantes'a

Eldono de la Grupo Esperantista Murcia

Prezo: 50 centimoj

1905

TIPOGRAFÍA MODERNA—AVELLANAS, 11

VALENCIA

1335

Hispanaj Grupoj Esperantistaj

- Hispana Societo por propagando de Esperanto.** *Prez.:* S-ro Ricardo Codorniu, Paseo del Malecón, C. Murcia. *Sekr.:* Rev. P. Antonio Guinart, Escuelas Pías, Valencia.
- Grupo Esperantista de Murcia.** *Prezid.:* S-ro Norman Maclean, Aguilas (Murcia). *Sekr.* S-ro P-ro Antonio López Villanueva, Vergara, 12, Murcia.
- Grupo Esperantista de Valencia.** *Prez.:* S-ro Generalo Ludoviko Moncada, Valencia. *Sekr.:* S-ro Kapitano Rafaelo Duyos, Buenavista, 21, Valencia.
- Grupo Esperantista de Manresa.** *Prez.:* S-ro P-ro Miguel Expectante. *Sekr.:* S-ro Eduardo Segarra, Borne; 8, Manresa.
- Grupo Esperantista de Enguera.** *Prez.:* S-ro Fernando Soler Valls, telegrafestro. *Sekr.:* S-ro Manuel Jordá García, publikinstrua profesoro, Enguera.
- Grupo Esperantista de la Coruña.** *Prez.:* S-ro Pascual Perea; *Sekr.:* S-ro Manuel Monteagudo, Bailén, 6, 3.º Coruña.
- Grupo Esperantista de El Royo (Burgos).** *Prez.:* S-ro Florencio Arambilet.
- Grupo Esperantista de Cardona.** *Prez.:* S-ro Ramón de Subirá. *Sekr.:* S-ro Juan Bautista Pelayo.
- Grupo Esperantista de Olsona.** *Prez.:* S-ro Antonio Mayo. *Sekr.:* S-ro Ramón Guvernet.
- Grupo Esperantista de Málaga.** *Prez.:* S-ro José Rodríguez Huertas.
- Grupo Esperantista de Barcelona.** *Prez.:* S-ro Alfonso Sabadell, Diputación, 280, pral.

Esperanta gazetaro

- Internacia Sciencia Revuo*: Librejo Hachette, 79, Boulevard St Germain. Paris. Jarabono: 7 fr.
- Lingvo internacia*: Presa Esperantista societo, 33, rue Lacépède, Paris. Jarabono: 7.50 fr.
- Tra la Mondo*: 15, Boulevard des deux gares, Mendon (S. et O.) Francujo. Jarabono: 8 fr.
- Internacia Revuo Medicina*: Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède. Paris. Jarabono, 12 fr.
- Espero Katolika*: 15, rue Etienne Pallu, Tours (Franc.) Jarabono: 2,50 fr.
- Juna Esperantisto*: 9, Avenue des Vollandes. Geneve (Svis.) Jarabono: 2 fr.
- Esperanta Ligilo*: por blinduloj, Braille'a sistemo, 12, rue Sufflot. Paris. Jarabono: 2,50 fr.

Propaganda gazetaro

- La Suno Hispana*, esperanta-hispana, Avellanás, 11. Valencia. Jarabono: 3 fr.
- Antaŭen Esperantistoj*, esperanta-hispana; Farmacia del Teatro. Calle Lartiga, Lima (Perú). Jarabono: 3 fr.
- Ĉilio Esperantista*, senpaga organo; S-ro L. E. Sepúlveda Cuadra, casilla 1989. Santiago (Chile).
- Meksika Lumturo*, esperanta-hispana; D-ro A. Vargas, Santa Rosa Necoxtla. (Ver.) Meksiko. Jarabono: 3 fr.
- L'esperantiste*, esperanta-franca; S-ro L. de Beaufront. Louviers (Eure). Jarabono: 3,50 fr.
- Esperanto*, esperanta-franca: unu numero: 0'10; S-ro P. Berthelot, Ceret (P. O.) 24 numeroj sinsekvaj: 3 fr.
- La Belga Sonorilo*, esperanta-franca-flandra; J. Coox. Duffel. (Belg.) Jarabono: 3 fr.
- Svisa Espero*, esperanta-franca: 6, rue du Vieux-College. Geneve (Svis.) Jarabono: 2 fr.
- The British Esperantist*, esperanta-angla: 13, Arundelstreet, Strand. London. Jarabono: 2 fr.

Germana Esperantisto, esperanta-germana; Esperanto Verlag, Möller & Borel, 95, Prinzen strasse, Berlin. S. Jarabono: 3,75 fr.

Gefratara Esperanta, esperanta-itala, sin turnu al *Tra la Mondo*. Jarabono: 4 fr.

Holanda Pioniro, esperanta-holanda. Drewes Uitterdijk, Hilversum (Holando).

Esperanta venkaro

Kolekto hispana aprobita de D-ro Zamenhof.

(Firmo J. Espasa, Cortes, 579, Barcelona.) Francos

- N.º 1. *Primeras lecciones de Esperanto*, de Th. Cart y A. L. Villanueva. 0'60
- N.º 2. *Manual y ejercicios de la lengua internacional Esperanto*, de V. Inglada Ors y A. L. Villanueva. 3'00
- N.º 3. *Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto*, de V. Inglada Ors y A. L. Villanueva.. . . . 6'00

Diccionario Esperanto Español de ratces, P. Antonio Guinart. Escuelas Pías. Valencia. . . . 1'00

Kolekto internacia

(Librejo Hachette, 79, Boulevard St-Germain-Paris.)

- Brueys et Palaprat.** *Advokato Patelin*, traduko de M. J. Evrot. 0'75
- Diversaĵoj**, de Lallement kaj Beau. 1'25
- Ekzerzoj de aplikado**, de L. de Beaufront. . . . 1'00
- Esperantaj prozaĵoj**. 2'50
- Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto**, de L. Zamenhof. 3'50
- Grabowski**, *Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio internacia*. 2'00
- Hamleto**, *dramo de Shakespeare*, traduko de L. Zamenhof. 2'00

TRI ĈAPITROJ

EL LA HISPANA VERKO DE

MIGUEL DE CERVANTES SAAVEDRA

LA SPRITA JUNKRO

DON KIĤOTO DE MANĈUJO

Esperantigitaj de

CARLO BOURLET || VICENTE INGLADA

KAJ

GEO C. LAW

Honoraj membroj de la
Grupo Esperantista de Murcio (Hispanujo)

Tradukoj rekompencitaj de
tiu ĉi Grupo en la konkurso literatura okazinta en
rememoro pri la tria centjaro post publikiĝo
de la senmorta ĉefverko Cervantes'a

Eldono de la Grupo Esperantista Murcia

Prezo: 50 centimoj

1905

TIPOGRAFÍA MODERNA—AVULJANAS, 11

VALENCIA

THE STATE OF MARYLAND

IN SENATE,

THE SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

IN SENATE,

Antaŭparolo

La celo de la Murcia grupo, aliĝinte al la festoj efektivigitaj en Hispanlando, por rememori la trian centjaron de la publikigo de la senmorta verko de nia glora Cervantes', estis honori lin, kaj samtempe montri, ke Esperanto taŭgas por traduki nian klasikan literaturon, konservante la nuancojn de la pensoj, kaj la fortikecon de la esprimado. Sed la provo donis al ni rezultaton, kiun ni ne pensis atingi.

Oni rekompencis tri tradukojn, de tri famaj esperantistoj: unu de nia franca apostolo S-ro Bourlet, Prezidanto de la grupo Pariza, kiu esperantigis laŭvorte sian ĉapitron el traduko franca; alian de sinjoro Vincento Inglada, tre konata kiel aŭtoro de gravaj verkoj esperantaj, kaj kiu, kompreneble, tradukis rekte el la hispana originalo; kaj la trian de S-ro Geo. C. Law, distinginda esperantisto angla.

Legante atente la tradukon de S-ro Inglada, kaj tenante antaŭokule la originalon, ĉiuj esperantistoj kies gepatra lingvo estas la hispana, rimarkos ke Espe-

ranto, kvazaŭ mola vakso, reproduktas fidele kion Cervantes' verkis, kaj ili konkludos ke la esperantistoj angla kaj franca, esperantigis same kion diras la tradukojn el kiuj ili ĉerpis la siajn. Kaj vi, la alilingvaj esperantistoj, volu kompari la tradukojn en viaj gepatraj idiomoj kun tiu de S-ro Inglada, kaj eble vi diros, ke nur Esperanto estas fidela spegulo por koinigi plene literaturan verkon, kiam ni ne elscias la lingvon en kiu oni ĝin verkis.

Mi dankas varme la respektindajn samideanojn kiuj per siaj tradukoj honoris nin, kaj ankaŭ ni esperas ke la Esperantistaro akceptos tiun ĉi broŝuron kun tiom da ŝato, kiom da plezuro ni sentas ĝin prezentante.

En la 30^a de Aprilo de 1905.

LA GRUPO ESPERANTISTA MURCIA.

Don Kihoto

UNUA ĈAPITRO (UNUA PARTO).

En regiono de Hispanujo nomata Manĉo vivis, antaŭ nelonge, nobelulo, kiu estis unu el tiuj, kiuj posedas pikstangon en sia armilportilo, malnovan epeon, malgrasan ĉevalaĉon kaj ian ĉashundon.

Peco da viando en la kuirpoto-pliofte bovaĵo ol ŝafaĵo-viandmiksaĵo ĉe l' vespero-el la restaĵoj de l'tagmanĝo, -en vendredo lentoj, en sabato ovoj kuiritaj kun lardo laŭ la hispana modo, kaj plie en dimanĉo ia kolombo, konsumis la tri kvaronojn de lia rentaĵo. La resto utilis por aĉeto de vestaĵoj, kiuj konsistis el jupo el bela drapo kun pantaloneto el veluro kaj veluraj ŝuoj por la festtagoj; dum la aliaj tagoj lia vestaĵo estis el bona drapo teksita en la lando.

Ĉe li vivis ia guvernistino, kiu-kvankam ŝi tion ne konfesis-estis pli ol kvardekjara, kaj nevino ne ankoraŭ dudekjara, kun servisto, kiu servis en la domo kaj sur la kampoj, kiu flegis la ĉevalaĉon kaj iris serĉi lignon en la arbaron.

La aĝo de nia nobelulo estis ĉirkaŭe kvindek jaroj. Lia farto estis fortika kaj vivplena, lia vizaĝo malgrasa kaj lia korpo seka kaj senkarna. Li estis frulevigema kaj tre ĉasema. Kelkaj alnomis lin Kihada aŭ Kesada. La aŭtoroj, kiuj pri li skribis, lin nomis diversmaniere: tamen estas verŝajne, ke li nomiĝis

Kifano. Cetere tio estas negrava por tiu historio, kondiĉe ke la resto estos fidele raportita.

Dum la tagoj, kiam la nobelulo nesciis kion fari (kio okazis almenaŭ dum la tri kvaronoj de l'jaro), li amuziĝis legante kavalirajn librojn, sed kum tiom da intereseco kaj da plezuro, ke li tute forgesis la ĉasadon kaj zorgon pri siaj aferoj. Li eĉ fariĝis tiel obstine legama, ke oni diras, ke li vendis multajn pecojn da tero por aĉeti romanojn, kiu fine plenigis lian domon.

Inter tiu granda kvanto da libroj ne estis unu, kiu pli plaĉis al li ol la verkoj de l'glora Felicio de Silva, Li estis ĉarmegata de la pureco de lia stilo kaj ĉiuj tiuj konfuzaj parolturnoj ŝajnis al li mirindaĵoj. Li precipe ne povis laciĝi de la lego kaj admiro de liaj dandaj kaj amindumaj leteroj, inter kiuj jen estas unu el la plej belaj frazoj: «La prudenteco kaj la malprudenteco, kiujn vi trudas al mia prudento, tiel forte malfortigas mian prudenton, ke ne senprudente mi plendas pri via beleco». Kaj jen tiu alia cito, kie li diras: «La altaj ĉieloj, kiuj kun la steloj die el via dieco vin fortigas kaj vin igas meriti la meriton, kiun meritas via nobleco.»

Meze de tiuj rezonadoj, nia malfeliĉa nobelulo perdis, iom post iom, la prudenton, kaj li sin turmentigis por trovi ilian sencon, ilin admirante tiom pli, ke li nenion komprenis.

Li kompatis pri la vundoj, kiujn faris kaj ricevis Don Belianiso, imagante ke, kiel ajn lertaj estus la ĥirurgiistoj, kiuj ilin flegis, ne povis ne postresti iaj strangaj cikatroj. Tamen li tre estimis la verkiston de tiu romano, kaj pli ol unu fojo, li estis tentata de l'deziro fini tiun libron, kiu haltis nefinita meze de rakonto de admirinda aventuro. Sendube li estus tion farinta, kaj eĉ sukcese, se aliaj fantazioj ne estus lokitaj en lia kapo.

Li ofte disputadis kun la paroĥestro de sia vilaĝo,

beletristo diplomita en Siguenza', pri la preferindeco inter Palmerino de Olivo kaj Amadiso de Gallujo; sed majstro Nikolao, la razisto de l'vilaĝo, pretendis, ke nenia kavaliro estas komparebla kun tiu de l'Suno kaj ke, se estus unu, li nur povus esti Don Galaoro, frato de Amadiso, kiu estis viro tute perfekta kaj ne ia ploremlulo aŭ delikatulo kiel Amadiso, kiu cetere tute ne lin superis koncerne la kavalirecon.

Unuvorte, nia nobelulo tiel forte sin profundigis en legadon dum tagoj kaj noktoj, ke, kaŭze de l'troa legado kaj de l'multa maldormado, lia cerbo tiel sekigis, ke li perdis la saĝon. Li plenigis sian imagon je la sensencaĵoj, kiujn li legis, kaj oni povas diri, ke lia kapo estis vera entenejo da sorĉaĵoj, disputoj, vetoj, bataloj, militoj, vundoj, amoj, amaj plendoj, turmentoj, suferoj kaj similaj vantaĵoj. Li eĉ tiel profunde enigis en sian cerbon ĉion, kion li legis, ke li ne kredis, ke povas ekzisti en la mondo ia historio pli vera. Li diris, ke Cid Ruy Diaz' estas tre bona kavaliro, sed ke ne estas komparo ebla inter li kaj la Kavaliro de l'Arda Epeo, kiu, per unu sola bato, distranĉis en du pecojn du gigantojn terure grandegajn. Li tre ŝatis Bernardon de Karpio, ĉar sur la Roncesvala ebenajo, li venkis Rolandon kvankam ensorĉitan, uzante la lertecon de Herkuleso, kiu sufokis inter siaj brakoj Anteonon, tiun eksterordinaran filon de l'Tero. Li ankaŭ tre kore parolis pri la giganto Morganto, kiu, kvankam apartenanta al tiu malhumila kaj malĝentila giganta raso, tamen estis bonmaniera kaj afabla. Sed neniun li tiel ŝatis kiel Reinaldos de Montalban', precipe, kiam li vidis lin elirantan el lia kastelo, kaj forrabortan ĉion, kion li renkontis, kaj kiam en Barbarujo li forŝtelis tiun idolon de Mahometo, kiu laŭ la historia diro, estis tuta el oro. Koncerne la perfidulon Galalon' li volonte estus fordoninta sian servistinon, kaj eĉ plie sian nevinon, por povi al li doni cent piedbatojn en la ventron.

Enfine, lia spirito estante jam konfuzita, enfalis en lian imagon la plej stranga penso, kiun iam naskis frenezulo. Li konvinkiĝis, ke li nenion pli bonan povos fari por la bono de l'ŝtato kaj por sia propra gloro, ol fariĝi eraranta kavaliro, kaj iradi tra la mondo por serĉi aventurojn, revenĝi ĉiujn ajn maljustaĵojn, kaj meti sin en tiom da danĝeroj, ke li tiel akiros senmortan gloron. Li imagis, la malfeliĉa nobelulo, ke li jam portas kronon gajnitan per la forto de sia brako, kaj ke li almenaŭ povas postuli la imperiestrecon de Trapizondo.

Meze de tiuj agrablaj pensoj, forportita de plezuro kaj plenblovita da espero, li nur revis pri la rapida plenumo de tio, kion li tiel fervore deziris. Unue li rebriligis la armilojn, kiuj iam apartenis al lia praavo, kaj kiujn la rusto jam de longe formanĝis en angulo de lia domo. Li purigis kaj rerektigis ilin kiel eble plej bone; sed vidante ke anstataŭ tuta kasko li havis nur simplan ferĉapon, li lerte fabrikis la reston el kartono kaj, kunligante la tuton, li al si faris ian specon de kasko aŭ almenaŭ ion, kio havis tiun ŝajnon. Sed okazis, ke, volante ekprovi ĉu ĝiestus sufiĉe forta por rezisti al tranĉrando de epco, li eltiris sian glavon kaj, per la unua ekbato, rompis tion, kion li pene fabrikis en ok tagoj. Tiu facila rompebleco malplaĉis al li, kaj, por averti tiun malbonaĵon, li refaris sian kaskon kaj metis interne malgrandajn subondojn el fero. Tiel li kontentiĝis kaj, ne ekprovinte ĝin denove, li konsideris ĝin kiel bone hardita kaj provita armaĵo.

Li poste ekpensis pri sia ĉevalo: kaj kvankam ĝi havis tiom da ŝvelaĵoj, kiom da kruroj, kaj kvankam la malfeliĉa besto havis nur haŭton sur ostoj, ĝi ŝajnis al li en tiel bona stato, ke li ne estus intersanĝinta ĝin kun la Bucefalo de Aleksandro aŭ la Babieko de l' Cido. Kvar tagojn li serĉis, kian nomon li al ĝi donos, «ĉar ne decus, li al si diris, ke la ĉevalo de tiel fama kavaliro ne havus nomon konatan de l' tuta

mondo.» Tiel li ekprovis komponi nomon, kiu povus konigi tion, kio ĝi estis estinta, antaŭ ol esti ĉevalo de eraranta kavaliro, kaj tion, kio ĝi tiam estis. Li precipe opiniis, ke estus juste, ke lia ĉevalo, ŝanĝinte sian staton, ankaŭ ŝanĝus sian nomon kaj alprenus unu brilan kaj konforman je sia nova profesio. Post longaj revadoj, ŝanceliĝoj, pliigoj, malpliigoj, faroj kaj malfaroj, li fine ĝin nomis Rozinanto, nomo, laŭ lia opinio, granda, brilega kaj signifa, vere inda por la unua ĉevalo de l'mondo.

Trovinte tiel belan nomon por sia ĉevalo, li ekpensis ankaŭ doni unu al si mem, kaj, post ok aliaj tagoj da revado, li fine nomis sin Don Kihoto: kio kredigis al la aŭtoroj de tiu vera rakonto, ke li kredeble nomiĝis Kinada, kaj ne Kesada, kiel aliaj diris. Sed nia heroo rememorigante, ke la brava Amadiso ne kontentiĝis pri sia sola nomo, kaj ke li ankaŭ aldonis tiun de sia patrujo kaj reĝejo por ilin glorigi, kaj sin nomis Amadiso de Gallujo, li same aldonis al la sia tiun de sia lando, kaj nomis sin Don Kihoto de la Manĉo, tiel kredante, ke lia familio kaj naskloko fariĝos konataj kaj rekomendindaj sur la tuta tero.

Post kiam li do rebriligis sian armilaron, faris el sia ferĉapo tutan kaskon, donis belan nomon al sia ĉevalo, kaj elektis unu gloran por si mem, li opiniis, ke mankas nur al li amota sinjorino, ĉar eraranta kavaliro sen amo estas arbo sen folioj kaj sen fruktoj, kaj vere korpo sen animo. «Se malfeliĉe, li al si diris, aŭ prefere se feliĉe mi ekrenkontas iun giganton, kiel okazas kutime al la erarantaj kavaliroj, kaj se, per la unua ekbato, mi lin teren faligas, aŭ lin duone disfendas, unuvorte, se mi lin venkas, ĉu ne estos bone, se mi scios al kiu mi lin donacos? Ĉu ne estos dece, se, alpaŝante mian sinjorinon kaj falante antaŭ ŝi sur genuojn, li diros per humila kaj respektema voĉo: Sinjorino, mi estas tiu giganto Karakuliambro, sinjoro de Malindrania insulo, kiun la nevenkebla kaj neniam

sufiĉe laŭdata kavaliro Don Kihoto de la Manĉo, venkis en duopa batalo; kaj laŭ lia ordono, mi venas por min ĵeti sub la piedojn de via sinjorina Moŝto por ke ŝi disponu de mi kiel de sia regato kaj sklavo? Ho! Kiel nia kavaliro aplaŭdis sin, post kiam li faris tiun belegan paroladon, kaj kiel granda estis lia ĝojo, kiam li ektrovis unu mastrinon por sia koro! Ŝi estis, laŭ tio, kion oni kredas, sufiĉe beleta kamparanino, filino de plugisto de lia vilaĝo, je kiu li iam kelkan tempon enamiĝis, kvankam ŝi tion neniam sciis aŭ tion neniam atentis. Ŝi estis nomata Alonzino Lorenzo, kaj ŝin li de tiu momento, elektis por ĉiam kiel sinjorinon de siaj pensoj. Poste, serĉinte por ŝi iun nomon, kiu ne estus malpli nobla ol la lia, kaj kiu estus iom princa, li fine nomis ŝin Dulcineo del Toboso ĉar efektive ŝi naskiĝis en tiu loko; kaj tiu nomo ne malpli plaĉis al li, ol tiuj, kiujn li elpensis por si mem kaj por sia ĉevalo.

Laŭvorte tradukis de franca traduko,

CARLO BOURLET.

Rimarko. En tiu teksto anstataŭ *nobelulo* oni ankaŭ povus uzi *Junkro*: kaj anstataŭ *eraranta kavaliro*, oni ankaŭ povus uzi *vaganta kavaliro*. Sed la elektitaj esprimoj ŝajnas pli ĝustaj; ĉar en bonaj tekstoj *erari* estas ofte uzata por signifi: vagi, iri ĉiufanken.

ĈAPITRO IV

Pri kio okazis al nia kavaliro, kiam li foriris
de la voĝastejo.

Estis kredeble tagiĝe kiam Don Kihoto eliris el la voĝastejo, tiel kontenta, tiel bele sintenanta, kaj tiel ĝojega sin vidi jam armita kavaliro, ke lia gajo debordiĝis tra la ĉirkaŭventraj rimenaĵoj de la ĉevalo. Sed ekrememorante pri la konsiloj de sia gastakceptinto, koncerne la tiel necesajn preparitaĵojn, kiujn li devis kunporti, speciale monon kaj ĉemizojn, li decidis reveni hejmen, kaj sin provizi je ĉio, kaj je armservisto, por kio li intencis akcepti kamparanon, najbaron sian, kiu estis malriĉa kaj infanhava sed tre taŭga por la armserva ofico de kavalirado (1). Kun tiu penso li gvidis al sia vilaĝo Rozinanton, kiu, preskaŭ konante ke ĝi tuj reheimiĝos, tiel volonte ekmarŝis, ke ŝajne ĝi ne tuŝis la teron per piedoj.

Li ne estis multe marŝinta, kiam ŝajnis al li ke dekstre, el la densaĵo de apudkuŝanta arbaro, eliris malgajaj voĉkrioj kvazaŭ iu plendas, kaj tuj kiam li aŭdis ilin, ekdiris: «La ĉielon mi dankas por la favoro kiun al mi ĝi faras, ĉar tiel senprokraste ĝi prezentas al mi okazojn, ĉe kiuj mi povas plenumi, kion devigas mia profesio, kaj kapti la fruktojn de miaj celdeziroj; jen tiuj ĉi voĉoj estas sendube de ia mizerulo aŭ mizerulino, kiu bezonas mian protekton kaj helpon; kaj deturnante la kondukilojn, li envojigis Rozinanton tien, kie ŝajne la voĉkrioj eliris.

(1) *Kavaliri*—plenumi la oficon, la funkciojn de kavaliro: agi kiel kavaliro. Komparu: *ĉefi*, *estri*, k. t. p.

Kaj je malmultaj paŝoj post eniro en arbaron, li vidis ĉevalinon alligitan al glanarbo, kaj al alia ankaŭ alligitan knabon, nudan de talio ĝis kapo, ne pli ol dekkvinjaran, kiu estis la voĉkrianto, kaj ne senkaŭze, ĉar per zornimeno lin vipadis altkreska kamparano, kaj al ĉiu vipbato li aldonis riproĉon kaj konsilon dirante: «La lango kvieta kaj la okuloj lertaj». Kaj la knabo respondis: «Ĝin mi ne refaros, sinjoro mia, je la Dia suferado, mi ĝin ne faros alian fojon, kaj mi promesas de nun pli atente gardi la brutareton». Kaj ekvidinte kio okazas, Don Kihoto diris per fiera voĉo: «Malĝentila kavaliro, ne decas esti kruela je kiu ne povas sin defendi: eksaltu sur vian ĉevalon, manprenu vian lancon (ĉar ankaŭ lanco staris apud la glanarbo, kie la ĉevalino estis bridalligita), kaj mi konigos al vi, ke tio estas afero de malbravuloj, kion vi nun faras».

La kamparano, kiu vidis al si venantan tiun figuraĵon plene armitan, kaj svingantan lancon al lia kapo, kredis sin tuj mortonta, kaj per afablaj vortoj li respondis: «Sinjor'kavaliro, tiu ĉi knabo, kiun mi ĵus batpunis, estas servisto mia, kiu gardas aron da ŝafoj, kiun mi havas je tiu ĉirkaŭaĵo: li estas tiel malzorga, ke ĉiutage unu ŝafo forperdiĝas, kaj ĉar mi punas lian malzorgon, aŭ perfidajon, li diras, ke mi tiel agas avarege nur por ne pagi al li la ŝuldatan salajron, kaj je Dio kaj mia animo, ke li mensogas».

«Li mensogas antaŭ mi, perfida malnoblulo!, rediris Don Kihoto. Je la suno, kiu nin lumigas, ke mi eksentas deziron vin trae piki per tiu ĉi lanco: pagu tuj al li sen alia respondo, kaj se ne, je la Dio, kiu nin regas, mi vin mortigos kaj neniigos senprokraste: malligu lin tuj.»

La kamparano mallevis la kapon, kaj eĉ vorton ne respondante, malligis sian serviston, kiun demandis Don Kihoto pri kiom al li ŝuldas lia mastro. Li diris, ke naŭ monatojn po sep realoj (1) ĉiumonate. La kalkulon faris Don Kihoto, kiu trovis, ke ĝi atingas la

sumon da 63 realoj, kaj diris al la kamparano, ke li tuj ĝin elpagu aŭ alie li nepre pro tio mortos. La malkuraĝulo respondis, ke je la okazo en kiu li troviĝas kaj je la farita priĵuro (kaj li ankoraŭ nenion priĵuris) li certigas, ke la ŝuldo ne estas tiom granda, ĉar oni devas dekalkuli kaj enspezen ricevi tri parojn da ŝuoj, kiujn li estis al li doninta, kaj unu realon por du sangeltiroj, kiujn oni al li faris kiam li estis malsana.

«Cio tio ĉi estas bona, rediris Don Kihoto, sed oni interŝanĝu la ŝuojn kaj sangeltirojn je la vipbatoj, kiujn vi senprave al li donis, ĉar se li tute eluzis la fedon de la ŝuoj, kiujn vi elpagis, vi batuzis la haŭton de lia korpo; kaj se la sangeltiristo elverŝigis lian sangon dum li malsanis, vi ankaŭ eltiris ĝin dum li bonfartis: tial li en tiu afero nenion ŝuldas.»

«Estas la malhelpaĵo, sinjor' kavaliro, ke mi nun ne kunportas monon: venu hejmen Andreo kun mi, kaj mi ĉion elpagos, realon post realo.»

«Ĉu ankoraŭ iri kun li? diris la knabo. Al la diablo! Ne, sinjoro, neniel, ĉar kiam li min vidos sola, tiam li senhaŭtigos min, kiel Sanktan Bartolome'on.»

«Li tiel ne agos, rediris Don Kihoto, sufiĉas ke mi ordonu ĝin, por ke li min respektu, kaj kondiĉe, ke li ĵuros tion je la kavalira rango, kiun li ricevis, mi lasos lin libera kaj estos certa pri lia elpago.»

«Atentu via Moŝto, sinjoro, kion vi parolas, aldiris la knabo, ĉar mia mastro ne estas kavaliro, nek ricevis ian kavaliran rangon: li estas Johano Haldudo, la riĉulo, loĝanto de Kintanaro.»

«Tio ĉi ne malhelpas, respondis Don Kihoto. Ĉar Haldudo povas esti kavalira nomo, tiom pli ke ĉiu estas filo de siaj agoj.»

«Tio ĉi estas vero, diris Andreo: sed mia mastro,

(1) Realo--hispana monero, kies valoro estas kvarono da peseto.

de kiaj agoj estas filo, li, kiu rifuzas elpagi mian salajron, kaj rekompenci mian ŝvitpenon kaj laboron?»

«Mi ne rifuzas, frato Andreo, respondis la kamparano, kaj faru al mi la plezuron kun mi veni, ke mi ĵuras, je ĉiuj kavaliraj rangoj ekzistantaj en la mondo, ke mi al vi elpagos, kiel dirite, realon post realo, kaj eĉ parfumitajn per pligajno» (1).

«Mi liberigas vin je la parfumo: elpagu al li kontante la ĝustan kvanton, tion mi nur postulas: kaj atentu plenumi tion laŭ via ĵuro, kaj se ne, per la sama ĵuro mi reĵuras vin elserĉi kaj puni, kaj mi vin trovos, eĉ se vi vin kaŝos pli zorge ol lacerto. Kaj se vi volas scii, por resti pli serioze devigata ĝin plenumi, kiu ordonas al vi tion, eksciu ke mi estas la brava Don Kihoto de Manĉujo, la malfaranto de ofendoj kaj senjustaĵoj, kaj restu kun Dio, ne prokrastante kion vi promesis kaj ĵuris, sub minaco de la montrita puno.» Dirinte tion, li sproninstigis Rocinanton, kaj tre rapide foriris de ili.

La kamparano sekvis lin per rigardo, kaj kiam li vidis, ke li estas transirinta la arbaron kaj ne revononta, li sin turnis al sia servisto Andreo, dirante: «Venu al mi, mia filo, mi volas elpagi kion mi ŝuldas al vi, kiel ordonis al mi tiu malfaranto de ofendoj.»

«Tion ĉi mi ĵuras, diris Andreo, kaj via Moŝto estos tre prava plenumante la ordonon de tiu bona kavaliro, kiu vivu mil jarojn, kaj ĉar li estas tre brava kaj bona juĝanto, se vi ne pagos min, je mia animo li revenu kaj efektivigu, kion li diris.»

«Ankaŭ mi ĝin ĵuras, rediris la kamparano, kaj tial ke mi tre amas vin, mi volas plialtigi la ŝuldon por ankaŭ plialtigi la elpagon.» Kaj lin kaptinte je la brako, li alligis lin al la glanarbo, kaj tiel multe lin revipadis, ke la knabo restis kvazaŭ mortinta.

(1) Hispana dirturno, uzita por montri, ke oni redonas aŭ proponas ion kun profito.

«Alvoku, nun, sinjoro Andreo, diris la kamparano, la malfaranton de ofendoj, kaj vi konstatos, ke li tiun ne malfaras, kvankam mi opinias, ke ĝi ne estas tute elfarita, ĉar deziro al mi alvenas vin senhaŭtigi viva, kiel vi timis.» Tamen li malligis lin kaj donis al li permeson iri serĉi sian juĝanton, por ke li efektivigu la antaŭdiritan kondamnon.

Andreo foriris iom malĝoja, jurante alserĉi la bravan Don Kihoton de Manĉujo kaj raportu al li detalon post detalo, ĉion, kio okazis al li, kaj ke la kamparano pagus al li pune sepfoje, sed malgraŭ tio, li foriris ploranta kaj lia mastro restis ridanta, kaj tiel la ofendon malfaris la brava Don Kihoto, kiu tre ĝoja pro la dirita okazintaĵo, kaj kredanta, ke li tre alte kaj feliĉe komencis siajn kavalirajn heroaĵojn, vojiris al sia vilaĝo, tre kontenta je si mem dirante:

«Prave vi povas vin nomi feliĉa super ĉiuj virinoj vivantaj sur la tero, ho inter belulinoj, bela Dulcineo, de Toboso, ĉar la sorto difinis al vi igi aldonita kaj submetita al via volo kaj deziro, kavaliron tiel bravan kaj jam konatan, kiel estis kaj estos Don Kihoto de Manĉujo, kiu, laŭ la tuta mondo scias, ricevis hieraŭ la kavaliran rangon kaj malfaris hodiaŭ la plej grandan maljustaĵon, kiun kreis la senpraveco kaj plenumis la krueleco: hodiaŭ li elprenis la vipilon el la mano de senkompata malamiko, tiel maljuste vipanta iun delikatan infanon.»

Tiam li alvenis en lokon, kie la vojo diskvariĝis, kaj li tuj ekmemoris pri la vojkruciĝoj, kie la vagaj kavaliroj ekpensis, kiun direkton ili devos sekvi: kaj por ilin imiti, li restis halte dum kelka tempo, kaj post profunda pripenso, li ellasis la kondukilojn de Rozinanto, decidante ke la ĉevalo vojelektu. kiu persistis en sia unua intenco reveni sian ĉevalejon.

Kaj post dumejla marŝado, Don Kihoto ekvidis grandan homamason: tio estis, kiel oni poste sciis, komercistoj Toled'aj vojirantaj al Murcio por aĉeti

silkon. Ili estis ses kaj marŝadis kun sunombreloj, akompanataj de kvar rajdantaj servistoj kaj tri picdirantaj mulgardistoj. Tuj kiam Don Kihoto ekvidis ilin, li figuris al si novan aventuron, kaj por imiti, kiom ŝajnis al li eble, la kavaliraĵojn, kiun li legis en siaj libroj, li trovis tre ĝustatempa aferon, kiun li intencis fari, kaj tiel, kun fiera sintenado kaj kuraĝelmontrō, li forte sin apogis sur la piedingoj, alpremis la lancon, levis la ledŝildon antaŭ la bruston, kaj haltinte meze de la vojo, li atendis la alvenon de tiuj vagaj kavaliroj (ĉar jam tiaj li opiniis kaj prijuĝis ilin). Kaj kiam ili alvenis en lokon, kie oni povis vidi kaj aŭdi ilin, per laŭta voĉo kaj aroganta elteniĝo diris Don Kihoto: «Ĉiuj haltu, se ĉiuj ne elkonfesas, ke en la tuta mondo ne estas pli bela knabino ol la imperiestrino de Manĉujo, la senpara Dulcineo de Toboso».

Je tiuj ĉi diraĵoj la komercistoj haltis por vidi la strangan figuron de la parolinto, kaj per la vortoj kaj eksteraĵo, ili tuj komprenis la frenezecon de Don Kihoto: sed ili volis atente koni la rezulton de la postulita konfeso, kaj unu el ili, kiu estis iom ŝercema kaj tre multe diskreta, diris: «Sinjor' kavaliro, ni ne konas, kiu estas tiu bela virino de vi nomita, montru ŝin al ni, kaj se ŝi estas tiel multe bela, kiel vi certigis, ni tre volonte kaj sen ia premdevigo, elkonfesos la veraĵon viaflanke petitan.»

«Se mi montrus ŝin, rediris Don Kihoto, kion vi farus konfesante veraĵon tiel klaraperantan? La afero estas, ke, ne vidinte ŝin, vi devas tion kredi, elkonfesi, certigi, ĵuri kaj defendi: se ne, vi tuj dueldatalos kun mi, viraro monstra kaj fiera: kaj ĉu vi albatalos unuope, kiel ordonas la kavalira leĝo, ĉu ĉiuope, kiel estas kutimo kaj malbona praktikado ĉe viaj samgentuloj, jen mi atendas vin, kaj esperas kun kunfido en la praveco, kiu estas ĉe mia flanko.»

«Sinjor' kavaliro, rediris la komercisto, mi petegas vian Moŝton, en la nomo de ĉiuj ĉi tie starantaj prin-

coj, kaj en la celo ne surŝarĝi nian konsciencón, per konfeso pri afero neniam de ni vidita nek aŭdita, kaj tiom pli, ke tiu elkonfeso estus tre malutila je la imperiestrinoj kaj reĝinoj de Alkarjo kaj Ekstrema-duro (1), ke via Moŝto bonvolu montri al ni portreton de tiu altrangulino, eĉ tiel malgrandan kiel grenero, ĉar per la fadeno ni trovos la bobenon (2) kaj tial ni restos konvinkitaj kaj certaj kaj via Moŝto kontenta kaj obeita. Kaj eĉ mi kredas, ke ni jam estas tiel partiaj por vi, ke kvankam la portreto montrus, ke mankas al ŝi unu okulo kaj el alia fluas minerala ruĝaĵo kaj sulfurŝtono, malgraŭ ĉio por plaĉi al via Moŝto, ni dirus, kion vi juĝos plej favora.»

«Ne elfluas, malnoblaj kanajloj, respondis Don Kihoto, flame ekkolerinta, ne elfluas-mi rediras-tio, kion vi diris, sed ambro kaj cibetaĵoj, kaj ŝi estas nek unuokula nek kurbstara, sed pli rektestara ol Gvadarama (3) fagostango: tamen mi pagos al vi por la granda blasfemo, kiun vi diris kontraŭ la belegeco de mia altrangulino» Dirinte tion, li sin ĵetis al la parolinto, kun la lanco mallevita, tiel furioze kaj kolere, ke estus tre malfeliĉe al la kuraĝa komercisto, se ne estus okazinta, ke Rozinanto meze de la vojo okaze marŝis mallerte kaj falis.

Falis Rozinanto kaj ankaŭ falrulis ĝia mastro grandan spacon sur la kamparo: li volis tuj sin levi kaj ne povis: tiom malhelpis al li la lanco, ledŝildo, spronoj kaj kapŝirmilo kun la pezo de la antikvaj armoj. Kaj dum li penis vane sin levi, li diradis: «Ne forkuru, malbravuloj, kaptitaro, atendu, ke ne pro mia kulpo sed pro mallerto de mia ĉevalo, ĉi tie mi kuŝas.»

Unu el la tieaj mulgardistoj, kiu sendube ne estis

(1) Hispanaj regionoj.

(2) Hispana popoldiro uzita por montri kunrilaton de du aferoj.

(3) Gvadaramo—nomo de hispana montaro.

tre bonintenca, aŭdante, ke la malfeliĉa falinto diras tiom da arogantaĵoj, ne povis ĝin toleri kaj sin deteni doni al li respondon sur liajn ripojn. Kaj alirinte al li, li prenis la lancon, disrompis ĝin, kaj per unu el ĝiaj pecoj batadis tiel multe nian Don Kinton, ke malgraŭ li kaj spite liajn armojn, li lasis lin trabatita kiel muelita grenajo. Liaj mastroj kriis al la mulgardisto, ke li ne tiom batadu kaj lin forlasu, sed li estis tiel ekscitita, ke li ne volis ĉesigi la batadon ĝis trankviligo de tuta sia kolero, kaj alpreninte la ceterajn pecojn de la lanco, li dispecigis ilin denove per batado sur la malfeliĉan falinton, kiu ĉe tia pluvego da batoj, ne fermis la buŝon kaj minacis ĉielon kaj teron kaj la perfidulojn, ĉar li kredis ilin tiaj.

La mulgardisto laciĝis kaj la komercistoj daŭrigis sian vojiron, dum kiu li povis rakonti pri la mizera trabatito, kiu, vidinte jam sin sola, denove penis sin levi; sed tio estis al li neeble kiam li ja estis sana kaj bonstata, kiel, do, li povus nun ĝin fari, trabatita kaj preskaŭ dismetita? Kaj tamen, li sentis sin feliĉa, ĉar ŝajnis al li, ke tiu malfeliĉo estis propra je vagaj kavaliroj, kaj li pri ĉio kulpigis la mallertaĵon de sia ĉevalo, kaj ne povis sin levi, tiel multe lia korpo estis trarapita.

El hispana lingvo tradukis,

VICENTE INGLADA.

ĈAPITRO LXI (DUA PARTO)

La akcepto de nia Heroo en Barcelono kaj lia interparolado kun la Ensorĉita Kapo.

Estis la tago de Sankta Johano, kiu ĵus aperinta, montris al la okuloj de niaj du herooj la belegan urbon Barcelono, la havenon, la riverojn, kaj la maron, kiu ŝajnis al ambaŭ multe pli granda ol la lagoj de Ruidera', tiel famaj en Manĉujo. Samtempe, la bruo de tamburetoj, la sono de hobojoj aŭdiĝis en la mezo de l'urbo: kaj ĝojaj krioj ĵetitaj en la aeron anoncis la solenecon de la festo. La ĉielo estis sennuba, la aero kvietaj, la suno per siaj oraj radioj heligis ĉiujn objektojn. La remŝipegoj kaj la boatoj, elmontrante flagojn kaj banderolojn, estis ekmoviĝantaj je la sonado de militaj kaj aliaj trumpetoj, ankaŭ de diversaj militaj iloj. Aro da kavaliroj, vestitaj en riĉaj vestoj, rajdantaj sur belegaj ĉevaloj, estis kurantaj galope laŭlonge la riverbordo: eksplodoj de pafiloj intermiksiĝis kun milita trumpetado; kaj la ŝipaj paflegoj respondis intertempe al la rempara artilerio.

Don Kihoto kaj precipe Sanĉo staris kvazaŭ blindigitaj je tia vido, kiam ili vidis, rapidigantan al ili, skadron de kavaliroj. Ili estis la amikoj de Roke', kondukataj de tiu kapitano. Alvenante, unu el ili ekkriis: «La spegulo, la torĉo, la inda modelo de kavaliroco estu bonvena en nia urbo! Ĉiuj konkuru fari riverencon al la brava, la glora, Don Kihoto, ne apokrifaj herooj pri kiu historiisto priskribis malbone al ni, sed al vera heroo de Cide Hamete Benengeli!»

Nia kavaliro ne havis la tempon por respondi; li estis ĉirkaŭita, premita, forportita al la urbo, en kiun li eniris meze de tiu ĉi hela skadro, antaŭrita per muziko, sekvita de amasoj da homoj, kiuj ĵetis sin sur la vojon. Tiamaniere, ili alkondukis lin ĝis la domo de Antono Moreno, riĉa junulo, amanto de la gajvivo, kaj la speciala amiko de Roke'. Ĉio estis preta por akcepti la heroon, Antono loĝigis lin en la plej bela ĉambro, malŝparis la honorojn kaj la plej zorgajn servojn; kaj Sanĉo, kiun li ne forgesis, ĝojis troviĝante en la domo de la bona Don Diego aŭ en la kastelo de la dukino.

Kiam Don Kihoto estis demetinta la batalilojn, kaj estis vestinta sin en sia luksa ŝamaj vesto, li rerenkontis la gastojn, kiuj atendigis tagmanĝon por li. Oni sidiĝis ĉe tablo, la juna edzino de Antono plej proksima de la kavaliro faris al li la festajn honorojn kun tiom da spriteco kiom da gracieco. Nia heroo elmontris al ŝi sian tutan ĝentilecon; kaj Sanĉo, ĉeestanta la manĝadon, kaj kies gajeco faris lin babilemulo, amuzis la gastojn rakontante tion, kion li faris dum sia regado.

Post la manĝado Don Antono alkondukis sian gaston kaj kelke da ĉeestantoj en grandan ĉambron, en kiu la ĉefa ornamajo estis bronza busto sur longa jaspasubtenilo. «Sinjoro kavaliro, diris li, montrante la buston, tiu ĉi kapo kiun vi vidas, kaj kiun eble vi imagas esti tiu de Imperiestro, estas la ĉefverko de Pola sorĉisto, aliĝinto de la glora Skotilo, pri kiu oni rakontas tiom da mirindaĵoj. Tiu ĉi eksterordinara viro loĝis ĉe mi, kaj po mil oraj moneroj donis al mi tiun ĉi buston, kiu respondas kiel homo al ĉiuj demandoj kiujn oni faros al ĝi. Vi estas la mastro—daŭrigis li—fari pruvon de ĝi nun kaj tie ĉi: kaj se vi volas mi komencos jam: sin turnante al la busto. «Kapo, diris li, mi demandas vin diri al mi mian nuntempan penson.» La busto, ne movante la lipojn, sed per voĉo klara

kaj aŭdebla respondis: «Mi ne penetras ĝis la pensoj.» Don Kihoto mutiĝis je miro, Sanĉo faris la signon de kruco. «Kapo, daŭrigis Don Antono, diru al mi kiom da personoj estas tie ĉi?» La busto respondis: «Vi, via edzino, du el viaj amikoj, du sinjorinoj, glora kavaliro nomita Don Kihoto kaj lia ĉevalservisto Sanĉo.» La miro de ĉiuj estis treĝa. Unu el la sinjorinoj senpacience dezirante fari demandon, alproksimiĝis kaj diris: «Kapo, instruu min pri la plej certaj metodoj ŝajni bela». «Tio estas fariĝi saĝa», respondis la busto. La alia sinjorino tuj alproksimiĝis: «Ĉu mia edzo multe amas min?» ŝi demandis. «Via koro instruos vin pri tio», respondis la busto.

Don Kihoto laŭvice volis demandi: «Kapo, diris li: ĉu tio kion mi vidis en la kaverno de Montesinos estas vera aŭ imaga? Ĉu mia ĉevalservisto plenumos la punon, kiu estis metita sur lin? kaj ĉu mi vidos la malensorĉiĝon de mia kara Dulcineo?» «Tio kion vi demandas, respondis la busto, pri la kaverno de Montesinos estus la temo de longa diskutado, kiun mi ne volas komenci. Via ĉevalservisto, per helpo de la tempo, plenumos la punon, kaj Dulcineo fariĝos tio kio ŝi ĉiam estis estinta».

«Estas sufiĉe!, elkriis la heroo, mi plendos pri nenio se mi alvenos ĉe tiu ĉi plej alta feliĉeco». Tiam Sanĉo kviete alproksimiĝis. «Sinjorino la kapo, diris li, ĉu mi ankoraŭ fariĝos regnestro? Ĉu mi revidos miajn infanojn kaj mian edzinon?» «Jes, respondis la busto, vi regnos en via domo, tio okazos kiam vi revidos vian Tereson kaj viajn infanojn.» «Per Dio! elkriis Sanĉo, mi povus paroli simile; kvankam mi ne estas sorĉisto!»

Antono komfortis la ĉevalserviston, promesante ke, alian tagon la kapo klarigos plie. Li finis pentante la alestantojn de tiu ĉi mirindaĵo konservi la sekreton; sed la sekreto estis malbone konsentita, kaj baldaŭ oni nur parolis en la urbo pri la Kapo Ensor-

ĉita. Antono, timante la Sanktan Oficejon, rapidis klarigi al la Inkvizitoroj, ke tubo lokita en la piedestalo de tiu ĉi kava busto portis al la orelo de viro kaŝita en suba ĉambro, ĉion kio estis dirita en la supra, kaj reportis sammaniere la respondojn, per kiuj tiu ĉi viro amuzigis sin. Malgraŭ tiu ĉi simpla kaj vera konfeso, la Inkvizitoroj, pro timo de kalumnio, ordonis ke oni rompigu la buston. Tiu ĉi cirkonstanco nur pli konvinkis Don Kihoto pri la vereco de la orakloj el la fama ensorĉita kapo.

El angla lingvo tradukis,

GEO. C. LAW.
